# La?dis Ban-Ki-moon decidon de Kubo sendi kunlaborantojn al Afriko.



La ?enerala sekretario de UN, Ban-Ki-moon, la?dis la decidon de Kubo sendi 165 kunlaborantojn al Afriko por batali kontra? ebolo kaj instigis aliajn landojn same fari.

“La ?enerala sekretario kontente bonvenigas la anoncon faritan de la kuba registaro”, esprimis la raportisto de UN, Stéphane Dujarric dum la taga gazetara konferenco de tiu internacia organo.

UN anka? dankis la mobilizon de la Afrika Unio kaj la helpoj oferitaj de aliaj landoj tra la mondo, inter ili Usono kaj Britio.

Li anka? petis al ?iuj ke neniu lando fermu la eniron al personoj devenantaj el Gvineo, Liberio kaj Sieraleono, kaj petis al flugkompanioj kaj transportaj entreprenoj da?rigi siajn konektojn kun tiuj landoj.

“Izoligi tiujn landojn povas krei pli da problemoj kaj malfruigi la klopodojn por haltigi la viruson de ebolo, anstata? preventi ties ekspansii?on”, emfazis Dujarric.

UN aktivigis ?i-semajne mekanismon de krizoj por mastrumi la tutmondan respondon fronte al la epidemio

kaj la ?enerala sekretario mem telefonis dum la lastaj tagoj al kelkaj internaciaj gvidantoj por peti subtenon.

Li anka? intencas kunvoki kunsidon altnivelan pri ebolo fine de la monato, kadre de la ?enerala asembleo de UN.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/33557-laudis-ban-ki-moon-decidon-de-kubo-sendi-kunlaborantojn-al-afriko

**Radio Habana Cuba**